Karaj gesamidanoj, karaj geamikoj, estimataj partoprenantoj kaj karaj gastoj,

Mi havas la honoron saluti vin okaze de la internacia Esperanta aranĝo − la kulturfestivalo INTER-FEST.

Tiu manifestacio okazas por la unua fojo en nia bela urbo Bjelovaro, la centro de la Departemento Bjelovar-Bilogora, kiuj volonte gastigas kaj ankaŭ plenkore aŭspicis la aranĝon.

Kiel vi certe scias, en nia urbo Esperanto havas pli ol unu jarcenton longan tradicion. Bjelovara esperantista societo hardiĝis dum la sukcesa organizado demultaj programoj, inkluzive de la 9 -a kongreso de kroatiaj esperantistoj, kaj kun la tempopaso la ideoj multiĝis.

Kelkaj geesperantistoj el la Bjelovara esperantista societo ekhavis la ideon organizi pli grandan kaj pli internacian aranĝon ol estis la kongreso. Kaj jen, nun ni ĉiuj kunvenin ĉi tie kun la Misio, ke INTER-FEST fariĝu rekonata eŭropa Esperanto-aranĝo kun vasta gamo da programoj, kiuj al neesperantista medio prezentos praktikan uzeblon de Esperanto kaj pere de tio instigos ĝian lernadon kaj instruadon.

En nia Vizio ni vidas la festivalon INTER-FEST kiel aranĝon, kiu volas kuraĝigi la Esperantan kulturkreadon kaj levi la prestiĝon de Esperanto en la kultura kampo.

La programoj de INTER-FEST, kiel vi vidas el la programlibro, inkluzivas diversajn branĉojn de literaturo, teatro, muziko, filmo, klerigo, lingvolernado, sed ankaŭ de interkultura interŝanĝo, turismo kaj aliaj aktivecoj, kiuj efekiviĝos per prelegoj, diskutrodoj, seminarioj, koncertoj, prezentaĵoj, konkursoj, kolokvoj, ekspozicioj, kaj tiel plu.

La okazigo de INTER-FEST estas dediĉita al la 130-jariĝo de Esperanto kaj la centa morto-datreveno de ĝia "patro" Ludoviko Lazaro Zamenhof.

Mi estas tre feliĉa vidi vin ĉi tie, kaj deziras al ĉiuj partoprenantoj agrablan restadon. Mi deziras, ke la festivalo fariĝu bona tradicio, kiu fortigos nian estontan kunlaboron sur kampo de kultura interŝanĝo, kiel la organizantoj difinis en sia Vizio.

Karaj geamikoj, vi alvenis el diversaj urboj kaj landoj, kaj ĉi-okaze mi deziras citi la konatan frazon de Ludoviko Lazaro Zamenhof, kiun li eldiris en la unua internacia kongreso de esperantistoj, okazinta en la franca urbo Bulonjo-sur-Maro en la jaro 1905.

Hodiaŭ en Bulonjo-sur-Maro kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.

Tiu frazo, eldirita precize je la hodiaŭa tago, la 5-an de aŭgusto de la malproksima jaro 1905, estas tre aktuala ankaŭ hodiaŭ, kiam en la gastama Bjelovaro renkontiĝas ne francoj, poloj kaj rusoj, ne slovenoj, bosnianoj kaj serboj, sed samideanoj kun samideanoj, dank' al la komuna lingvo Esperanto.

Ĉe la fino mi deziras parafrazi niajn aŭspiciantojn kaj deziri al vi multajn jarojn da sukcesa laboro kaj rekazigon de ĉi tiu valora festivalo. Kaj nun bonvolu ĝui la vespermanĝon. Bonan apetiton!